GRUPO ESPERANTISTA

# "FIDO KAJ ESPERO"

VALLADOLID

Año 2005 Nº 217

MAYO-JUNIO

Dirección Postal: Apartado, 119; 47080 VALLADOLID

Adherido a la Federación Española de Esperanto


## EDITORIAL

Aún cuando, por las circunstancias de todos conocidas, las actividades del Grupo Esperantista no se realizan de una manera regular, no es menos cierto que, aprovechando las coyunturas que se nos presentan, vamos poniendo, contando como es natural y lógico con el entusiasmo y la entrega de alguno de nuestros socios, nuestro pequeño granito de arena en la difusión y conocimiento del idioma **Esperanto**.

Una de esas circunstancias se presentó el pasado mes de Abril, con motivo de las Fiestas Patronales de la Facultad de Filosofía y Letras de nuestra Universidad, cuando un grupo de alumnos organizó, como alternativa cultural al habitual programa de "*bailoteo y botellón*" las **I Jornadas Culturales de la Facultad de Filosofía y Letras**,

Entre los diversos actos programados, entre los días 26 al 28 de abril, citaremos, por ser el que nos atañe, el celebrado el jueves 28, en el Salón de Actos **"Lope de Rueda"** de la Facultad de Filosofía y Letras, donde, desde las diez de la mañana hasta el mediodía y bajo el título general de ***Esperanto, vehículo de cultura internacional*** hablaron **Rodrigo Portela,** alumno de dicha Facultad y coordinador de esta parte, sobre "*Lenguas Planificadas*", **Pedro Garrote,** Tesorero de la Federación Española de Esperanto, sobre "*Zamenhof y su obra*", finalizando **Mª Rafaela Urueña**, Profesora de Derecho Internacional de la Universidad y ex Presidenta de la Federación Española de Esperanto, disertando sobre el tema "*Problemas Lingüísticos en las Relaciones Internacionales.*

Aunque el número de asistentes, como es habitual en estos actos, no fue muy numeroso, la profusión de carteles distribuidos por toda la Facultad hizo que todo el "mundo" supiera de su celebración y al menos leyeron la palabra Esperanto que seguramente, a más de uno, le traería recuerdos del pasado



# JOHANO PAŬLO LA 2a KAJ ESPERANTO

Ĉiuj scias, ke Esperanto estas aprecata en Pollando, en kies katolika medio ĝi estas uzata de jardekoj. En tiaj cirkonstancoj ne estas mirige, ke la tiama Metropolito de Krakovo, kardinalo Wojtyła, sekvis kun simpatio la katolikan E-movadon. Tio kulminis en 1977, per la akcepto de la Alta Protektado de la 37a IKUE-kongreso, al kiu li sendis mesaĝon.

Okaze de la Kongreso, la tiama kardinalo Wojtyła estus devinta ne nur ĉeesti, sed eĉ celebri la Sanktan Meson kaj prediki en Esperanto. Papo Paŭlo la 6a, per telegramo kiun li sendigis de mons-ro Innocenti, rajtigis kardinalon Wojtyła celebri tiun Meson en Esperanto. Ĉio estis jam preta, kiam neatendita cirkonstanco devigis la kardinalon rezigni pri la aranĝo.
Temis pri la neatendita enterigo, en tiu tago, de la Metropolito de Poznan, en kies funebra ceremonio nepre devis partopreni Kardinalo Wojtyla.

Alian esprimon de simpatio kardinalo Wojtyła faris malmultajn monatojn antaŭ la elekto al papado, kiam li bondeziris al EK okaze de la 75-jara datreveno de Espero Katolika.

Dum la papado de Johano Paŭlo la 2a la katolika E-movado travivis multajn gravajn momentojn de sia historio: agnosko de IKUE kiel asocio laŭ papa juro, aprobo de la Meslibro kaj Legaĵaro, enigo de Esperanto inter la lingvoj uzataj de la Papo Kristnaske kaj Paske.
**Kun Johano Paŭlo la 2a Esperanto fariĝis ne nur lingvo "aprobata", sed ankaŭ "parolata" de la katolika Eklezio.**
La unua fojo, kiam Papo parolis en Esperanto dum publika ceremonio okazis en Ĉenstoĥovo, kadre de la monda junulara tago: la 14an de aŭgusto 1991, vespere, okazas lia bonveniga saluto. "Mi donas ankaŭ en Esperanto bonvenan saluton al la junaj pilgrimantoj el la tuta mondo, en ĉi tiu tago de universala frateco, kiu vidas nin unuigitaj kiel filoj de unu sama Patro en la nomo de Kristo, vero de la homo!"
La postan tagon, ferme de la celebroj, la Papo denove adresas siajn plurlingvajn salutojn al la gejunuloj en Ĉenstoĥovo ankaŭ en Esperanto.

Ekde Pasko 1994 la Papo aldonas Esperanton al la plurlingvaj bondeziroj "Urbi et orbi" (al Romo kaj al la mondo). Ekde tiam je Pasko li diras: "Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta"; je Kristnasko: "Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron".

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

# 64 Congreso Español de Esperanto



Durante los días **7 al 10 de Julio** del presente año 2005, los esperantistas españoles, y cuantos procedentes de otros países, tengan a bien acompañarnos, nos reuniremos en la histórica y culta villa de Alcalá de Henares, villa natal de Cervantes, para participar en el Congreso Español de Esperanto.

El hecho de que este año se conmemore el IV Centenario de la Publicación de la obra cumbre de la literatura en lengua castellana, ***El Ingenioso Hidalgo Don Quijote de la Mancha*** tendrá un papel primordial en la programación del Congreso; así, podremos asistir a las conferencias que, en español, sobre el tema *El Quijote imaginado. Las líneas principales de su recreación literaria en el siglo XX*, impartirá **Amelia FERNÁNDEZ** y la que pronuncie sobre *Don Quijote y el encantamiento de la incomunicación* D. **José RODRÍGUEZ**

Por otro lado, **David GALADÍ,** destacado esperantista y astrónomo, nos hablará en Esperanto sobre *Sancho Panza lee la hora en el cielo: comentarios astronómicos al capítulo XX de la primera parte de El Quijote*. Y dirigirá bajo el título *Noche astronómica: contemplación de las estrellas*, una sesión práctica acerca del método de Sancho Panza para leer la hora en el cielo.

También tendremos ocasión de visitar los principales monumentos de Alcalá, entre ellos la CASA-MUSEO DE CERVANTES: donde se hará donación de un ejemplar de "*La Inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha*". Y contemplar, al igual que los complutenses, la exposición que con el título ***Así veo yo a Don Quijote*** será montada con los dibujos de niños esperantistas de todo el mundo que han participado en el Concurso que al efecto convocó la Federación Española de Esperanto.

No podría dejarse de aprovechar la ocasión para rendir un homenaje a Fernando de Diego traductor de la obra cervantina a la lengua universal y así en los días del Congreso podremos escuchar, naturalmente en Esperanto, a destacados esperantistas hablar sobre *Influencia de Fernando de Diego en la literatura original en esperanto.* (**Jorge CAMACHO**) y sobre *Las traducciones de Fernando de Diego* (**Antonio_VALÉN**)

Naturalmente, y como es de todo punto lógico, se celebrarán reuniones de todo tipo, destacando la Reunión General de la Federación Española de Esperanto en la que se hará un análisis de la labor realizada desde el pasado Congreso y se presentarán las propuestas e ideas para el futuro.

Muchos han sido los Congresos Españoles de Esperanto a los que, a lo largo de mi vida esperantista he asistido y de casi todos ellos, guardo un grato recuerdo y tengo el presentimiento de que, el de este año en ***Alcalá***, a juzgar por los prolegómenos, espero que sea uno de ellos.


L. Hernández

# Tra la Mondo

## La Estraro de EEU kunvenis en Kolonjo


La 23-an kaj la 24-an de aprilo 05 kunvenis la estraro de Europa Esperanto Unuiĝo (EEU) en Kolonjo (Germanio). Pro la foriro de Marko Naoki Lins el la funkcio de direktoro de BKC oni akceptis liajn raportojn pri la aktivado de Brusela Komunika Centro kaj dankis lin pro sukcesa deĵorperiodo. La estraro elektis inter 4 kandidatoj novan direktoron. Tio estas Ben Indestege el Bruselo. Ankaŭ oni traktis financojn kaj planon por 2005 *(el la retinformejo NUN)*

## Homoj kun homoj en la Centra Oficejo



Sabate la 23-an de aprilo okazis la jam tradicia printempa malferma tago de la Centra Oficejo de UEA. La oficialan statistikon ni ankoraŭ ne disponas, sed laŭ diversaj raportoj ĉeestis eble sesdeko da vizitantoj, do laŭ la populareco la ĉi-printempa malferma tago estis nek rekorda, nek malrekorda. En la malferma tago Ziko M. Sikosek prezentis sian novan libron pri la historio de Universalaj Kongresoj. *(el la retrevuo Informa Folio)*

## Speciala numero de ESPERO KATOLIKA




Antaŭnelonge aperis speciala, 84-paĝa numero de **ESPERO KATOLIKA**, kun multaj tekstoj kaj koloraj fotoj, kiuj prezentas la vivon de nia karmemora Papo **Johano Paŭlo la 2a** kaj la biografion kaj unuajn tagojn de papado de **Benedikto la 16a.** Se Vi ne estas membroabonanto de IKUE. Vi povas mendi ekzempleron de ĉi tiu speciala numero kontraŭ 10 EUR, skribante al: ikue @ ikue.org

## Reklamo pri Esperanto aperos tra Google

Pli ol 30.000 vizitojn monate ricevas la retejo Lernu.net, kie eblas studi Esperanton en 24 lingvoj. Pluraj dekoj da kunlaborantoj vivigas la projekton kiun financas la organizaĵo Esperantic Studies Foundation. Ankaŭ tra la popularega ret-serĉilo Google baldaŭ disvastiĝos reklamo pri Lernu.net. Fine de marto la teamo de la retejo sukcesis gajni konkurson de Google pri senpaga reklamo. De tiam aktivuloj preparadis la reklam-ŝildojn kiuj aperos diversloke en la reto fine de majo aŭ komence de junio

# Humoro

## Sinceridad

Llega el marido a casa después de trabajar y se sienta a la mesa. Se acerca la mujer y le dice al Marido:
¿Te sirvo?
A veces

## *Cuestión de Peso*

Era una señora tan gorda pero tan gorda que cuando se pesaba la báscula marcaba: Continuará...

## Vaya Definición

¿Qué es una esposa?
Una cosa que uno no quiere, hasta que es deseada por otro.

## **Diri la Veron**

Maljunulo sentas sin mortonta kaj vokas sian multe pli junan kaj viglan edzinon al si:
- Nun mi baldaŭ mortos... diru al mi sincere, ĉu miaj infanoj vere estas miaj...
- Sed... hezitas la edzino. Kaj se montriĝos, ke vi ne estas mortonta?

## **Spertulo Pri Pentraĵoj**

Turisto vizitis ekspozicion de pentraĵoj kaj parolis al lia amiko:
- Tiu ĉi pentraĵo estas vere realisma. Ĝi vekas mian apetiton.
La konulo tiel demandis:
- Kiel eblas, ke sunsubiro vekas vian apetiton?
La turisto respondis:
- Ĉu tio estas sunsubiro? Mi pensis, ke estis fritita ovo!

## Alcalá atendas nin

Ĉi jare la hispana geesperantistaro kunvenos en la histori kaj arta urbo **Alcalá de Henares** por en amika kaj harmonia etoso okazigi la **64ª Hispanan Esperanto-Kongreson** de la 7ª ĝis la 10ª deJulio 2005. Pri la urbo jam aperis raporton hispanlingve en pasinta numero kaj en la nuna, ankaŭ hispane, ni publikigas etan resumon de la bunta programo kiu estas antaŭvidita. Kiel sciate, la slogano de la Kongreso estas ***DonKihoto parolas Esperanton*** Pli detale en numero 370 de Boletín kaj en la retpaĝo de la Federacio: www.esperanto-es.net

PERIÓDICO

GRUPO ESPERANTISTA
Apartado, 119
**47080 VALLADOLID**